



8-6-1974

CGC N^o
00406 504/1000-06

Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA - DISTRITO FEDERAL

Sede: Edifício Jockey Clube, sala 103

Setor Comercial Sul

REDAÇÃO E PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalho, 31 - AP. 73

Telefone 4-8033

11.100 - Santos (SP)

SECRETARIA

Caixa Postal 07 - 1182

Telefone 226-1298

70.000 - Brasília (DF)

(Correspondência para a redação: endereço acima)

NOVEMBRO DE 1981

ÓRGÃO OFICIAL DO BKE

BOLETIM N^o 65

II-A KONGRESO DE BKE

La evento realiĝis en la grandurbo San-Paŭlo, de la 31-a de oktobro ĝis la 2-a de novembro de 1981a.

Aliĝis 130 personoj el diversaj urboj kaj ŝtatoj.

En la fama "Liceu Coração de Jesus" okazis ĉiuj laboroj kaj dum du tagoj estis debatitaj la statutoj de BKE kaj elektita nova direktoraro, kiu zorgos pri ĝia progreso. La nova prezidanto de la organizaĵo estas s-ano Carlos Augusto Siqueira da Cunha, bone konata esperantisto el Brazilo.

Estis decidite, ke krom la ĝisnunaj aliĝintaj organizaĵoj, BKE havigu individuajn membrojn ankaŭ. Do, ek de la 1-a de januaro de 1982-a eblas aliĝi al la societo ĉiu interesato, kiu volos partopreni ĝin.

Laŭ la nova statuto la vicprezidantoreto nomiĝas delegita reto de BKE, kun la antaŭaj kondiĉoj de vicprezidantoj.

Siavice BKE aliĝos al UEA, kiel landa organizaĵo de Brazilo.

Ĝia Informa Bulteno daŭre estos eldonita, kiel ĝis nun.

La ĝisnuna prezidanto F. S. Almada estis elektita honora prezidanto de BKE, posteno, kiun li akceptis kaj sekve ne volas partopreni alian organizaĵon kun alia posteno.

Estis ankaŭ antaŭviditaj aliaj postenoj en la kadro de BKE: tiuj, kiuj helpas

REDAÇÃO: MARIA ALMADA

subteni la organizaĵon kaj tiel progresigi nian movadon en Brazilo, ricevos honorigan titolon. Estas interese eluzi la favorajn kondiĉojn, kiujn ni sukcesis pere de la 66-a UK en nia lando.

La ĉefa trajto de la 2-a Kongreso estis ke partoprenis ĝin parto de la plej elstaraj esperantistoj de nia movado. Kun bedaŭro ni konstatis, ke multaj ne ĉeestis ĝin pro pluraj kaŭzoj.

En la organizado de la statuto elstaris inter aliaj, D-ro Ivo Sanguinetti el Porto Alegre; sur la oratora kampo, D-ro Walter Francini; prelegis s-ano Euclides G. de Carvalho kaj s-ano Ivon Barbosa el Bauru, D-ro Oswaldo Sangiorgi kaj s-ano Izo Goldman; grupo de niaj karaj gesamideanoj el Curitiba kaj aliaj.

Ĉiuj briligis la eventon pere de sia ĉeesto.

La plej grave estis ke dum la 2-a Kongreso la ĉeestintoj, senescepte, aktive kunlaboris kontentige.

La sanktan meson celebris la pastroj Roque Santos kaj Urbaitis.

Muzikis kaj lantis grupoj el São Miguel Paulista kaj São Paulo. La ĝejnuloj gajigis la kongresistojn, ĉar ilia ĉeesto estis tre alloga en nia movado. BKE helpas la junularon: Estis disdonitaj premioj al la junuloj José Luiz Ferreira kaj Paulo Sergio Barreto, aljuĝitaj pro ilia partopreno en la oratora konkurso.

Lastmomente aliĝis al la kongreso la jenaj gesamideanoj: D-ro Modesto Belmonte de Abreu, Fernando José Galvão Marinho, Maria Cristina Ferraz de Toledo, Mariene Duarte, Gildemar Carneiro dos Santos, Lacorday de Andrade, Walter Gomes, Waldir Lisboa Rocha, Dalva Lisboa Rocha, Jozeph Irenklewskü, Arlindo Baruskaite Vasiunas, Euclides Carneiro da Silva, Dinah Carneiro da Silva, Amálio Hevia Carvalho, Vera Lucia Rocha, Lauro Jorge de Oliveira, Carlos Henrique R. Quadros, Juarez Henrique C. da Silva, Severina Alves de Lima, Dulcinea Vieira B. Guerreiro, Ilda V. Auricchio, Walquiria V. L. Rubio, Misuji Kajii, Asagai Mubunga, Denise Vernaci, José João Robl, Jonas Felix de Oliveira, Manoel Henrique de Sá Machado, Benedito de Paula, Clovis Soares Etsbevery, Chersoneso Galvão, Marcelo Vieira de Andrade, Fiorina P. de Souza, Ernesto P. Dias, Azalia M. Dias, João Paulo do Nascimento, Roberto Leittiere, José Carlos D. Ramos, Afonso Celso de Oliveira, Antonio Rodrigues da Silva, João Manoel Aguilera Jr., Solange Helena Aguilera, Adolfo Miranda da Silva, Deise da Silva Miranda, Sirio Silva.

Enspezoj de la Kongreso:

Diverskategoriaj aliĝintoj - Cr\$	46.350,00
Donaco	3.000,00
Sumo	49.350,00

Elspezoj:

Program-invitoj	jCr\$ 4.200,00
Paperujoj (Brazilio)	13.000,00
Skribiloj (")	1.200,00
Insignoj (São Paulo)	2.600,00
Afikoj (")	1.500,00
Liceu Coração de Jesus (")	3.000,00
Komunloĝejo (")	1.200,00
Premio por Oratora Konkurso (")	3.000,00
Sumo	29.700,00

Enspezoj	Cr\$ 49.350,00
Elspezoj	Cr\$ 29.700,00
Saldo	Cr\$ 19.650 - 2 -
Cr\$ 9.825,00 al SPEA kaj BKE.	
Parolado de la Prezidanto:	

"Estimataj Gesamideanoj!"

Mi direktas min al vi en la portugala lingvo pro la detaloj, kiujn mi bezonas diri al vi. Mi faras ekspozicion pri ĉio, kion la Brazilia Konsilantaro de Esperanto realigis dum la sep jaroj de ĝia ekzisto, ne nur en nia lando sed ankaŭ eksterlande.

La starigon de BKE oni ŝuldas al stagno de la esperanta movado en Brazilo. La ideo pri iu nova organizaĵo jam estis pripensata; mankis tamen ago por ĝia efektivigo.

En januaro 1974 grupo da esperantistoj kunvenis en Brazilio por pritrakti la aferon, kaj en majo, ankoraŭ celante la saman intencon, denove ili kunvenis en San-Paŭlo, sed la celo ne estis atingita, t.e., la fondo de nova organizaĵo.

La 8-an de junio, tamen, de la sama jaro, en Belo Horizonte, en la sidejo de Instituto Esperanto pri Edukado, fine okazis la definitiva paŝo, kiun partoprenis pluraj batalantaj gesamideanoj.

Post debatoj de la temo estis decidita la kreo de la organizaĵo, kiu ricevis la titolon Brazilia Konsilantaro de Esperanto, kies unua estraro estis elektita en la sama okazo, estante prezidanto F. S. Almada; vic-prezidanto ekzekutiva Elvira Fontes; ĝenerala sekretario Nelson Pereira de Souza; financa direktoro Carlos Augusto Siqueira da Cunha. Estis ankaŭ decidite, ke la kreita societo havu informan bultenon por la ĝeneralaj komunikaĵoj, kiel oficiala organo de BKE, elektinte sam-inon Maria Almada respondeculon por ĝia redaktado.

Kiel ni scias, tiu organo plenumis tre kontentige sian taskon ĝis nun kiel vervele la sola informilo akurata de la Latina Ameriko.

BKE laŭ ĝia statuto konsistas el pluraj societoj esperantistoj aŭ ne, sed brazilaj. Partoprenas la organizaĵon grupo da vicprezidantoj, nomumitaj dum ĝia sepjara ekzisto, kunlaborantoj kaj reprezentantoj de la organizaĵo dum okazaĵoj al kiuj ili ĉeestas.

La estraro de BKE kune kun siaj kunlaborantoj realigis la jenon ĝis nun: En 1974, la 2-an de julio kontaktis la

rektoron de la Federacia Universitato de Juiz de Fora, celante enkonduki la instruadon de Esperanto en la saman. Laŭ ĝia ofico n^o 2158/74, ĝi respondis al ni aprobante la sugeston, sed nur en la 4-a de junio 1976 la efektivigo okazis per la Rezolucio 15/76, kiu decidis enkonduki la instruadon de Esperanto I kaj II ĉe la Fakultato pri Beletro de la Univesitato, kaj la Mag. José Passini estis ŝargita gvidanto de la kursoj.

Kvankam iom malfrue tiuj kursoj komenciĝis, kaj funkcias regule.

En la sama jaro BKE partoprenis la Seminarion organizitan en Fortaleza (CE), kie grupo da gesamideanoj volis batali kontraŭ la ekzisto de nia organizaĵo, sed dank' al energia defendo farita de ĝia prezidanto la ribelo sereniĝis kaj la grupo silentis.

En 1975 BKE komuniĝis kun la Ministerio pri Edukado kaj Kulturo, skribinte al s-ro Ministro D-ro Ney Braga, sugestante la enkondukon de Esperanto en la lernejojn de 1-a kaj 2-a gradoj, ĉar la enkonduko de fremdaj lingvoj jam estis permesita, laŭ informo de Prof-ro Newton Sucupira.

D-ro Ney Braga, nun guberniestro de la ŝtato Paraná, fariĝis tiel simpatia al Esperanto, ke li decidis aliĝi al la 66-a UK okazinta en Brazilio.

Tiun alproksimiĝon de D-ro Ney Braga al Esperanto oni ŝuldas al lia tiam, Speciala Asesoro, D-ro Justino Alves Pereira, amiko de la Familio Almada.

Ankoraŭ en la sama jaro 1975-a, la prezidanto de BKE ricevis leteron de D-ro Viktor Sadler, Ĝenerala Direktoro de UEA, responde al tiu, kiun li lin direktis sugestante la okazigon de UK de Esperanto en Brazilio.

En tiu respondo D-ro Sadler informis, ke la eventon UEA konsiderus kun simpatio kaj serioza konsidero, sed ĝia efektivigo postulus anticipan kaj akuratan pristudon.

En 1976 je la 30-a de januaro la prezidanto de BKE leterumis al deputito federacia Athié Jorge Coury pledante pri helpo ĉe la urbestro de Santos celante no-

mi Esperanto unu el la stratoj de la urbo. La pledo estis atendita kaj la urbestro permesis nomi Esperanto unu placon, anstataŭ straton.

Ankoraŭ en 1976 je la 18-a de julio, dum la 11-a Seminario de Esperanto okazigita en Brazilio, la ĝenerala sekretario de BKE skribis leteron al UEA, subskribitan de la estraro de BKE kaj de aliaj altrangaj esperantistoj ĉeestantaj la Seminarion, petante la okazigon de monda kongreso en Brazilo, kio, kiel ni scias, okazis kaj ege kontentigis la estraron de UEA kaj ankaŭ al brazilanoj, kiuj neniam estis partoprenintaj tiel elstarajn eventojn.

En 1977 la prezidanto de BKE, kunlabore kun Centro Esperantista de Santos, konsentis pri realigo de la 12-a Seminario de Esperanto de KKE, en Santos, kiu estis bone realigita kun sukceso.

En la sama jaro estis lanĉita la libro Esperanto Elementar, verko de F.S. Almada, kun granda kaj ĝenerala akcepto, nun jam elĉerpita.

En 1978, de la 17-a ĝis la 22-a de julio, BKE promociis la efektivigon de la 1-a Latina-Amerika Kongreso, kunlabore kun aliaj organizaĵoj kaj la Ĉef-delegito de UEA por Brazilo, kio okazis en la urbo Marilja (SP), sukcesinte havigi de la Federacia Gubernio Kruz, 120.000,00 kiel subencion por helpi la eventon.

En 1979 BKE lanĉis kampanjon tra la tuta lando celante havigi monon por aĉeti propran sidejon. Kiel oni vidis, la kampanjo bone sukcesis dank'al malavara helpo de la geesperantistoj sindonaj, kaj la sidejo estis aĉetita en Brazilio. Ĝi estas tute pagita kaj la definitiva akto estis subskribita dum la 66-a UK.

Ankoraŭ en la sama jaro okazis la 64-a UK en Lucerno (Svisujo), kiun partoprenis la prezidanto de BKE ĝin reprezentante.

En 1980 BKE realigis sian 1-an kongreson en Juiz de Fora (MG), kunlabore kun la loka komunumo, ricevinte apogon de la gazetoj tieaj kaj radio.

En Stokholmo, ankoraŭ en 1980, okazis la 65-a UK, kaj la prezidanto de BKE ĝin ĉeestis kiel reprezentanto de la

organizaĵo.

En la sama jaro BKE promociis la Sud-Brazilan Renkontiĝon en la urbo Porto Alegre, kunlabore kun la Esperanto-Societo Porto Alegre kaj Esperanto-Societo Rio Grande. La evento estis tre impona kaj ricevis elstaran apogon de la gazetara, radia kaj televida servoj.

En 1981, kiel ni jam diris, realiĝis en Brazilio, de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto la sopirata UK, kiu ricevis la numeron 66. Ĝi okazis en la moderna ĉefurbo Brazilio, kies promocion oni ŝuldas al iniciato de BKE, helpata de la ĉef-delegito de UEA.

Fine, por fermi ĉi tiun resuman ekspozicion rilatan al niaj laboroj, ni havas la 2-an Kongreson de BKE, realigatan en San-Paŭlo, kunlabore kun la Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, dum kiu estis elektita nova estraro por nia organizaĵo, kies prezidanto estas s-ro Carlos Augusto Siqueira da Cunha; kaj reformita ĝia statuso kun ampleksaj povoj, kiuj ebligis la organizaĵon flugi pli alten. Mi dankas la kunlaboron de la Administracio de la Kolegio "Coração de Jesus", kiu favoris la kongreson disponiginte salonojn por la pluraj laboroj; de la Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, kiu klopodis ĉiamaniere por la sukceso de la evento kaj de la ceteraj elementoj, kiuj malavare kaj morale helpis la lastajn paŝojn de la mandato de nia estraro.

Dankegon! Karegaj gesamideanoj!

MONON POR LA BULTENO

Ni ricevis de la jenaj kaj dankas:

De Maria Almada/pentraĵoj	Cr\$ 1.000,00
Cheroneso Galvão	500,00
Edson Levy Resta	200,00
Antonio João F. Padilha	200,00
Cicero Pimentel	500,00
Fany Dupré	1.000,00
Claudio Zimmermann	300,00
BKE-2-a Kongreso	9.825,00
Tuto - Cr\$	13.525,00

GAZETOJ RICEVITAJ

Ni ricevis la jenajn, kiuj bone informas pri la Esperanto-movado: Diário de Taubaté, ACIG, Jornal de Jundiaí, Jornal

de Guarulhos, Gazeta Esportiva, Sei, A Caminho da Luz, Impacto, BEJO-Bulteno, Agora, O Jornal do Sul, Suda Stelo, O Trabalho, Jornal da Cidade de Bauru, kaj "A Candeia", de Brazilio.

BEJO EN NATAL (RN)

Grupo da gesamideanoj starigis ĝiĉeton kaj vendadis diversajn aĵojn dum la 2-a kongreso de BKE en San-Paŭlo.

Ili disdonis la bultenon de la junulara organizaĵo pere de kiu anoncas la IV-an Brazilan Junularan Kongreson, okazontan en Natal, de la 28-a ĝis la 31-a de januaro de 1982-a.

Ankaŭ ili varbis novajn anojn dum la 2-a Kongreso. Inter aliaj personoj patroniĝis sam-ino Maria Almada, kiu okazigos en Natal pentraĵekspozicion favore al BEJO dum ĝia kongreso.

La gejunuloj forton streĉas por vigligi la movadon kaj estas petate al ĉiuj plenkreskuloj aŭ ne aliĝi al BEJO-movado kaj helpi al la junularo.

La adreso de ĝia organizaĵo estas: Neima Cardoso Adorno, Caixa Postal 11-1110 - 70.000, Brazilio (FD). Por ĝia IV-a Kongreso estas: Olivia Andréa Bezerra Pelinca da Costa, Caixa Postal 291, 59.000 - Natal (RN). Al ĉiuj anticipe dankon!

TRA BRAZILIO

Fortaleza (CE)

Ĉe la Universitato Federacia de Ceará, en tiu urbo, nia s-ano Paulo Amorim Cardoso konstante instruas Esperanton. La direktoro de "Centro de Humanidades" de la U.F.C., prof-ro Luiz Tavares Junior forte interesiĝas pri la Internacia Lingvo kaj kunlaboras por fia disvastigado. Dank' al tiu profesoro ĉe la Universitato oni instruas Esperanton.

Sano Amorim Cardoso eldonis bonan lerno-libron sub la titolo "Esperanto Lingua Viva", kiu jam estas en sia 4-a eldono.

SALVADOR (BA)

Kiel ĉiame la Bahia-Esperanto Socie-

to bone agadas. Aparte ni mencias la nacilingvajn artikolojn de s-ano Saraiva Matos en la periodaĵo "Impacto".

La senĉesa propagando pri nia movado estas tre grava, ĉar ni devas rekruti novajn geesperantistojn. Ni deziras sukceson al bahianoj.

BAURÚ (SP)

La anaro de la "Sociedade Bauruense de Esperanto" estas gratulinda. Ili senĉese agadas por nia movado.

Ĝia prezidanto, s-ano Euclides Geraldis Carvalho prelegis dum la 2-a Kongreso de BKE pri la instruado de la Internacia Lingvo, oficiale, en la lernejoj, kun granda sukceso.

Same s-ano Ivon Barbosa amuzigis kaj esploris samtempe la lingvoscion de la gekongresanoj. Lia kunlaborado estas imitinda.

Ni ricevis gazeteltraĉaĵon kaj leteron de prof-ro Antonio João Fraga Padilha, el la sama urbo, kiu bone propagandis pri la kongreso de BKE.

En diversaj lernejoj kaj fakultatoj Esperanto estas instruata. La anaro serioze klopodas akiri propran sidejon kaj certe ili sukcesos. BKE dankas la valoran kunlaboradon de niaj karaj bauruanoj.

CAÇAPAVA (SP)

Sano Gilberto Silva Velho senlace kunlaboras kun la naciaj gazetoj, ne nur en Caçapava, sed ankaŭ en la tuta "Vale do Paraíba". BKE multe dankas al li pro tiu konstanta helpo. Li estas unu el niaj fidelaj anoj kaj hapablaj propagandistoj.

GUARULHOS (SP)

D-ro Lacorday Andrade agadas en tiu urbo. Li instruas la Internacian Lingvon kaj ankaŭ propagandas pri la movado, pere de radio (OM 1450 Khz). Li organizis kurson per radio, kio estas tre interesa. Ni Gratulas kaj deziras sukceson.

SAN-PAŬLO (SP)

La San-Paŭlo Esperanto-Asocio pli kaj pli fariĝas grava en Brazilo. Ĝia prezidantino Elvira Fontes organizas diversajn

kursojn, verkas akurate artikolojn por la gazeto "Diário Popular" kaj aliaj. Prof-ro Walter Francini ankaŭ verkas artikolojn pri Esperanto por spiritismaj periodaĵoj. Aliaj gesamideanoj same klopodemaj helpas la prezidantinon ĉiamaniere. En la libro-servo de la Asocio estas bonaj kaj interesaj verkoj de la plej elstaraj verkistoj, kiuj povas esti akirataj. Tiu, kiu aĉetas librojn helpas la movadon kaj ankaŭ la societon. La libroj estis vendataj dum la 66-a UK kaj ankoraŭ estas akireblaj en San-Paŭlo; temas pri parto de la stoko de UEA.

SÃO SIMÃO (SP)

En tiu urbo la gazeto "O Trabalho" aperigis artikolon pri la Internacia Lingvo Esperanto. La artikolon verkis s-ano Humberto M. Tedesco.

Ni scias nenion pri tiu urbo kaj se ekzistas esperantistoj tie ni pretas kontakti ilin.

MOGI DAS CRUZES (SP)

Prof-ro Euclides Carneiro da Silva sciigis nin, ke li nuntempe gvidas kursojn pri la Internacia Lingvo en la sidejo de la Sindikato de la Metalurgiistoj kaj en la kolegio "São Marcos".

Inter la gelernantoj troviĝas universitataj profesoroj, kiuj entuziasmiĝis pri Esperanto.

Prof-ro Carneiro da Silva eldonis interesan libron "Lernokajeron" pri la kunmetitaj verboj kun la sufikso "um" - amindUMI, butikUMI, ktp. Lia adreso en Mogi das Cruzes: - Rua Capitão Paulo Freire, 366 - CEP 08.700.

PORTO ALEGRE (RS)

La prezidanto de la Esperanto-Societo de Porto Alegre, s-ano D-ro Ivo Sanguinetti, informis nin, ke la dua Sudesperanta Renkontiĝo okazos dum la monato septembro de 1982-a, en la ĉefurbo de la ŝtato Paraná, Curitiba.

Sendube ĝi estos bonege organizota de niaj karaj geamikoj el Curitiba. Ĝi estos sukcesa kaj utila por la tuta Esperantomovado en nia lando. Certe ni ĉeestos.

SANTOS (SP)

Lalibro "ESPERANTO ELEMEN-TAR" de nia ĥonora prezidanto F. S. Almada, estas eldonata nun en sia 2-a ampleksigita eldono, aperonta en decembro, ĉar la 1-a eldono elĉerpiĝis jam de kelka tempo. Ĝi estos trovebla ĉe Esperanto Asocio de San-Paŭlo kaj en nia redakitejo.

CAMPO GRANDE (RJ)

Okazas nuntempe en tiu urbo tre interesa ekspozicio pri esperantaĵoj (libroj, flagoj, fotografiaĵoj, poŝtmarkoj kaj korespondaĵoj diversaj inter fremdaj landoj) kunhelpata de la prefektejo kaj sekretario pri Edukado kaj Kulturo kaj Ĝenerala Kultura Departamento da la urbo sub la gvido kaj organizado de Kampogrande Esperanto-Klubo. Ĝi estis inaŭgurita la 5-an de Novembro kaj funkcios ĝis la 25-a, de lundo ĝis vendredo de la 8-a horo ĝis la 18-a.

Ni deziras sukceson al la estraro de la klubo.

LOS ANGELES (USONO)

Kun granda bedaŭro ni diskonigas la forpason de nia kara samideano Sigurd Glasen, de tiu urbo, kiu kune kun lia edzino Elen M. Glasen, fariĝis niaj bonegaj geamikoj en Usono. Al nia amikino ni tre kore kondolencas. Ambaŭ estis fervoraj geesperantistoj.

VOTUPORANGA (SP)

La gazeto "A Vanguarda" el tiu urbo, aperigas interesan artikolon pri abelbredado, temo pritraktita en kunsido okazinta en la Rotaria Klubo de Votuporanga.

Prof-ro Valdir Moreira, nia kara samideano, prelegis pri la afero klarigante ĉiujn vidpunktojn pritraktantajn la formadon de la abelkulturo kaj ĝiaj ekonomiaj aspektoj.

Prezidis la kunsidon s-ro Joaquim Ferreira da Costa Filho kaj ĝin partoprenis la plimulto de la rotarianoj kaj ĝin ĉeestis, inter aliaj, la gejunuloj Luiza Maria B. Garcia, Claudia Cristina G. Martins, Miguel B. Garcia, Vera Lucia F. Mendon-

ça, Derci de O. Lopes, Siderley de Brito, Marle da Silva Ferreira, João Pontes Guilhaermine e Edméia M. Forti, ĉiuj Esperanto-lernantoj.

La Esperanto-movado progresas en Votuporanga, kie oni jam diplomigis 50 personojn post unujara instruado.

BRAZILIO (FD)

Kiel oni vidas laŭ la enmetita cirkulero, BKE invitas la geesperantistojn de nia lando partopreni ĝin kiel unuopajn membrojn, flanke de la societoj, kiuj ĝin konsistigas. La organizaĵo estas preta helpi siajn anojn per ĉiuj manieroj, eĉ ebligante ilin aliĝi al UEA, transpagante iliajn kotizojn al Ĉef-delegito, kiu loĝas en Brazilio, rekta reprezentanto de la Universala Asocio.

CONVOCAÇÃO ESPECIAL

O BKE que sempre recebeu acolhida amistosa de todos os esperantistas do Brasil, e mesmo do exterior, com a alteração realizada em seus estatutos será, a partir do ano entrante, sócias individuais e, para tanto, envia, junto com este boletim, uma circular-adesão concitando seus amigos a se unirem a ele num esforço de entusiasmo para coroar seu êxito, obtido nos quase oito anos de sua existência. E, como o seu presidente, ora transformado em presidente de honra, sempre recebeu apoio dos estimados coidealistas do nosso País, apelo a todos no sentido de vencermos mais este passo para a vitória final.

Agradecido

F. S. Almada
(Presidente de Honra)